# EKO 2025 — Bleko kun eĥo

EKO 2025-15. Aprilo 10. Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Sen alkroĉaĵo: Sume 300 KB

## Lingvoj gravas: tutmonda gvidilo pri multlingva edukado

Unesko publikigis novan gvidilon pri la graveco de lingvoj por edukado. La verko disponeblas en la angla kaj franca, kaj estas senpage elŝutebla ĉe **https://unesdoc.unesco.org/ark:/48223/pf0000392477**.
La premiso ke edukado devas okazi en lingvo komprenata de lernantoj, estas konata de esperantistoj, tamen ne estas realaĵo. Nia mondo enhavas ĉirkaŭ 7000 lingvojn, tamen 40% de la lernantoj ricevas instruojn en lingvoj kiujn ili nek parolas nek flue komprenas; en kelkaj landoj tiu cifero atingas 90% de la lernantoj. Tutmonde, nur 351 lingvoj estas uzataj kiel instrulingvoj, kaj pliaj 336 estas instruataj kiel studobjektoj.

Multlingva edukado ne temas nur pri lingvoj, sed celas antaŭenigi inkluzivecon, egalecon kaj diversecon, por krei daŭripovan, unuigan kaj prosperan estontecon por ĉiuj, en multlingva mondo. La verko sekvas la principojn de alia dokumento de Unesko, ***Edukado en Multlingva Mondo*** (2003), kaj aldonas gvidliniojn por publikaj politikoj kaj praktikoj kiuj rekonas multlingvismon kiel homan trajton kaj esencan edukadan vojon.

Avantaĝoj de multlingveco sendependas de specifaj lingvoj: tio signifas, ke flueco en endanĝerigataj indiĝenaj lingvoj akcelas la samajn kognajn avantaĝojn de flueco en tutmondaj lingvoj, kaj kompreneble de flueco en Esperanto. Cetere, socioj kiuj antaŭenigas lingvan kaj kulturan diversecon ofte spertas plian socian unuiĝon ol tiuj kun unulingva politiko. Multlingvismo gravas por plibonigi lernajn rezultojn, plibonigi alireblecon kaj inkluzivecon, kaj kontribui al daŭripova evoluigo.

## Kongresa Universitato

Ĉi-jare la oferto responde al la invito de UEA por la Internacia Kongresa Universitato (IKU) estis la plej abunda depost la pandemio. La IKU-ĵurio (Fiedler, Goodall, Maitzen, Vergara, Wen kaj Wandel) multe laboris por prezenti tiun ĉi raporton. Kontentiga estas la nombro de altnivelaj proponoj de personoj, kiuj estas novaj por IKU: signifa parto de virinoj kaj du afrikanoj. El la ricevitaj proponoj la estraro de UEA aprobis 17 prelegojn: 3 kursojn de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), 6 IKU-prelegojn kaj 8 prelegojn por la Scienca Kafejo (SK):

**AIS:** Bebenina, Koutny, Kolka, Wandel
**IKU:** Barandovská, Jacobsen, Lindstedt, Luheka, Niyukuri, Planchon
**SK:** Alebić-Juretić, Bormann, Fernández, Fontaine, Gruner, Guerra, Jackson.

La detaloj aperas en tabelo, kune kun la resumoj en la IKU-paĝo: https://uea.org/kongresoj/universitato. La temoj varias de lingvistiko kaj spacteknologio ĝis historio kaj arkitekturo. Apud konataj kaj ŝatataj prelegantoj kiel Koutny, Jacobsen kaj Bormann aperos multaj novaj (almenaŭ por IKU) tamen kompetentaj talentoj. La IKU-rektoro estas prof. Barandovská-Frank, deveninto de Brno, kiu ankaŭ prelegos pri temo ligita al la kongresurbo. Por ĝui la abundan sciencan programon, aliĝu al la 110-a Universala Kongreso de Esperanto, kun rabato ĝis la fino de junio.
https://uk.esperanto.net/2025/

## Multlingveco en Eŭropo subtenata

Por batali kontraŭ unulingvismo en la institucioj kaj antaŭenigi lingvan diversecon, Eŭropa Unio adoptas Esperanton kiel provizoran oficialan lingvon por la monato aprilo. Poste, la oficiala lingvo rotacios monate inter ĉiuj lingvoj de la Unio. Kompromiso estis trovita inter la Parlamento kaj la Konsilio por permesi, ke du pliaj monatoj estu dediĉitaj al regionaj lingvoj, kun unu dialekto tage. En tiu kompromiso, la flandra estos traktata kiel aparta dialekto de la Nederlanda. La lingvoj, dialektoj kaj kreoloj de la eksteraj regionoj estos konsiderataj sed ne tiuj de la transmaraj landoj kaj teritorioj. Fonto en la franca: https://www.sauvonsleurope.eu/les-breves-du-premier-avril/

Sendis: Remus (Raymond Gérard)

## Ondo da jubileoj

Antaŭ 75 jaroj, la 1-an de aprilo 1950 naskiĝis **Sten Johansson** (1950- ), sveda eksoficisto kaj verkisto, aŭtoro de 29 libroj en Esperanto. En aprilo jubileos **Peter Zilvar** (75 jaroj) kaj **Jacques Le Puil** (85 jaroj). Ni gratulas kaj bondeziras! La aprila listo, kompilita de Aleksander Korĵenkov, enhavas ankaŭ jubileojn kaj memordatojn de forpasintaj eminentaj esperantistoj: Vilho Setälä, Aleksandr Saĥarov, Itô Kanzi k. a. Legu ĝin en *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2025/04/aprilo-9/

## Brno progresas

Je la 10-a de aprilo 2025 jam 928 personoj el 61 landoj aliĝis al la 110-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos somere 2025 en Brno. Plej multaj aliĝintoj estas el Germanio (105), Ĉeĥio (95) kaj Pollando (93).
Legu pli en *La Ondo de Esperanto* ĉe https://sezonoj.ru/2025/04/brno-16/.

## Refoja invito al la 58-a ILEI-kongreso en Beogrado, Serbio

Ĉi-jare vian ILEI-kongresan travivaĵon specife kolorigos la ĉarmo de Beogrado kaj gastamo de Serbio. Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj organizas tie sian ĉefeventon por ĉiuj, ne nur por instruistoj kaj sendepende de lingvoscio!
**Ĉio en unu loko – en la Hotelo Palace** (https://palacehotel.rs/)

- Kongresejo, loĝado kaj manĝoj
- Labora, kleriga kaj kulturarta programo
- Kursoj por komencantoj kaj por tiuj kiuj volas plibonigi sian lingvonivelon
- Simpozio „Artefarita intelekto kaj lingvolernado“

- Lingva festivalo

**Pliaj detaloj, aliĝilo, mendilo:** https://2025.kongreso.org/ilei-chefa.html
**Aliĝu rekte:** https://2025.kongreso.org/alighilo.html

**Ĉu vi iam lernis...**

Koreajn tradiciajn dancojn?
Kalkuli en la afrika lingvo kirundi?
Deklari amon en la ĉina?
Utiligi artefaritan intelekton?

Tion ĉi vi povos sperti ĉe la kongreso! Aliĝis **98 partoprenontoj el 22 landoj.** Detaloj pri la tuttagaj ekskursoj legeblas en **IPR 2025/1** (Internacia Pedagogia Revuo) kaj en **Eventaservo**. Sekvu ankaŭ la **Fejsbukan grupon "ILEI kongresoj"**.

## Historio de BET

En la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* estis aktualigita la resuma statistika tabelo pri la Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET) ekde la 1-a ĈET (1959, Latvia SSR) ĝis la 58-a BET (2024, Estonio). Legu la aktualigitan tabelon kaj la klarigan artikolon de Povilas Jegorovas ĉe https://sezonoj.ru/2024/05/bet-11/.

Jen nova kaj interesa artikolo en la retejo uea.facila pri Afrikanoj antaŭ la interreto:

https://uea.facila.org/artikoloj/opinioj/afrikanoj-anta%C5%AD-la-interreto-r469/

Ahmad Mamduhi, prezidanto de ILEI

## Virinoj rondiras rakonte

Jen la evoluoj de la Rondiranta Rakonto de la Komisiono pri Virina Agado de UEA.
En marto aldoniĝis kontriibuo de Aŭstralio kaj verkis du novaj ĉinaj virinoj. Do, entute ĝis nun kontribuis 36 virinoj el 13 landoj. Verkemulinoj estas bonvenaj kontakti min.

Alessandra Madella

## Lernolibro en la svahila

Sub 'eldonado' en la retejo de ILEI aperis la bitaj versioj de la lernolibro de Esperanto en la svahila de Joel Muhire kaj de la Raporto pri la Internacia Tago de Virinoj 2025 fare de la Komisiono por Virina Agado de UEA (kompilis Arko). Jen kunligo por elŝutado!

https://www.ilei.info/agado/KIESPERANTO%20KWETU%202025%20bita%20eldono.pdf

Alessandra Madella

## Akademia renovigo

En februaro kaj marto 2025 la Akademio de Esperanto renovigis siajn membraron, estraron kaj direktoraron. Legu prian artikolon de la sekretario de la Akademio, François Lo Jacomo, kiu ĵus aperis en *La Ondo de Esperanto* ĉe https://sezonoj.ru/2025/04/akademio-27/ [LO]

## Printempa Jarfoiro en Diest, Belgio

La 27-an de aprilo oni festos la Heredaĵotago en Flandrio/Bruselo. La nova arkivejo de IEspA havos Malferman Pordon. La oficiala malfermo de la arkivo tamen okazos en

posta dato. Eblos konatiĝi kun la ejo, kie nun la tuta originala arkivo jam alvenis. Eblos vidi la arkivaĵojn, la laboron faritan kaj la laboron plu farendan. Eblos sinanonci kiel volontulo por la plua arkivado kaj ekscii pri la taskolisto. La najbaroj kaj aliaj Diest-anoj povos konatiĝi kun la internacia lingvo Esperanto. Fotoj videblas ĉe
http://iespa.eu/index.php?ln=eo&pg=ejo
Ĉiu bonvenas, sen antaŭanonco, inter la 10-a kaj 17-a horo. Adreso: Hasseltsestraat 26, BE-3290 Diest.
En dimanĉo la 27-a, la parkejo kontraŭ la arkivejo estos senpaga. La stacidomo troviĝas je 1,4 km; se necese eblos antaŭrezervi kaj uzi *Belbus* kiu haltos ĝuste antaŭ nia pordo.

Internacia Esperanto-Arkivo, (sendis Marc Vanden Bempt

## La nov-zelanda registaro mendas ŝipojn

La ministro pri fervojoj Winston Peters anoncis, ke la registaro financos la aĉeton de du novaj interinsulaj pramoj, kiuj servos ekde 2029.



***SMG:*** La konekto inter la du ĉefaj insuloj de la lando nepras. Mi multfoje uzis pramŝipan servon inter Wellington kaj Picton (kaj poste per trajno ĝis Christchurch.) Tiu plia iro kutime temis pri mirinda servo, kiu nomiĝis *La brasika trajno*, ĉar ĝi portis ne nur brasikojn sed pliajn legomojn de Marlborough ĝis la foiroj de Christchurch. La trajno alvenis je 05.16 matere, konvenaj por la brasikoj sed ne por la homoj. Tiu nokta trajno estis esence vartrajno, sed oni aldonis unu pasaĝeran vagonon, kiu iam estis unuaklasa, do la seĝoj tre komfortis kaj permesis eĉ dormeton.

========= vortoj: 1275 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Dek numeroj de 2025 aperis, lune kun kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.